
# KKPS 3 – salutoj de la maro

Finiĝis jam la tria Klaĉkunveno Postsomera, ĉi-foje en Wijk aan Zee (Kvartalo ĉe Maro), kaj la vorto, kiu plej bone priskribus ĝin, estas *plena*. La loĝejo estis plenplena kun pli ol okdek tranoktantoj, la programo estis plenplena kun kursoj, trinkado kaj festado, kaj la manĝejo estis plena kun du malsamaj manĝo-ofertoj. La plenecon kaŭzis inter alie amasa subvenciado de partoprenantoj el Italujo kaj Polujo. Sed ankaŭ kuniĝo kun la *studsemajnfino*, la renkontiĝo de maljunaj nederlandaj Esperantistoj, kun kiu KKPS unuafoje kuniĝis, plenigis la renkontiĝon.



Kaj la maljunuloj ne evitis la festadon: ilia neatendita trinkemo kelkfojo kaŭzis elĉerpon de trinkejaj varoj, kaj kiam la polico venis por trankviligi du tro entuziasmajn festantojn, tiam ne temis pri la junuloj. Feliĉe partoprenantoj bone solvis la $C_2H_5OH$-mankon per mem kunportitaj bongustaĵoj.

Grandan dankon al ĉiuj, kiuj per sia organizado, subtenado aŭ partopreno kontribuis al la sukceso de tiu ĉi KKPS. Post du fojoj en la okcidento kaj unu en la mezo de Nederlando la kvara KKPS verŝajne okazos pli oriente. Vi trovos freŝajn informojn en nia nova retpaĝo http://kkps-klacxkunveno.wikidot.com.



# Pos-Amiko

**Vintro 2014, Numero 11**

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

**INDEKSO:**

1. TEJO planas aliĝi al la Eŭropa Unio

2. JES nuligas festadon por oferti pli da prelegoj

3. Diskriminacio kontraŭ diskriminaciemuloj!

3. El la tombo de Zombenhof

3. Horoskopo

4. EVENTOJ

**KOLOFONO**

Pos-Amiko estas eldonaĵo de Nederlanda Esperanto-Junularo kaj aperas kvarfoje en la jaro.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

**http://kkps-klacxkunveno.wikidot.com/Pos-Amiko**

## TEJO planas aliĝi al la Eŭropa Unio

Post trankvila periodo kun manko de klara direkto la estraro de TEJO nun starigis por la organizo novan celon: iĝi la 28-a membroŝtato de la Eŭropa Unio. La paŝo surprizas multajn, sed pristudado montras, ke ŝanĝitaj ĉirkonstancoj donas pli grandan ŝancon ol iam ajn antaŭe por la projekto. Estrarano Mandirola laŭte klarigas:

M: "Jam dum jaroj TEJO provadas akiri pli grandan rekonon por Esperanto kaj la Esperanta movado. Ĉi-jare ni havis du sukcesojn kun Fernando Maia Jr. en la plenuma organo de la Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj kaj Michael Boris Mandirola en la CBMA de la Forumo Junulara Eŭropa, kaj tio malfermas por ni novajn pordojn. Krome TEJO kaj ĝiaj landaj sekcioj jam intense kunlaboras kun la EU en diversaj subvenciaj projektoj."

P: "Kiaj estus la konkretaj avantaĝoj por TEJO-membroj de la planita membriĝo?"

M: "Nia ĉefa instigo por la paŝo estas, ke la EU akceptas kiel siajn oficialajn lingvojn nur la naciajn lingvojn de siaj membroŝtatoj. Do per iĝi membroŝtato Esperanto aŭtomate iĝus oficiala lingvo de la EU. Krome TEJO-membroj havus kiel aliaj EU-enloĝantoj la rajton senvize vojaĝi kaj labori en ĉiuj membroŝtatoj.

Tio ŝparus multajn invitleterojn.”

P: “Ĉu la Eŭropa Unio nun, en tempo de krizo, pretas por akcepti novan membroŝtaton?”

M: “Ĝuste nun TEJO estus tre bonvena membro. Nia longa tradicio de neŭtraleco kaj respekto por homaj rajtoj kongruas kun la EU-principoj. Krome ni havas pozitivan kasrezervon, la Stelo estas stabila kaj nia ununura banko estas finance sana, do ekonomie ni pli bone fartas ol plejparto de la EU-membroj.”

## JES nuligas festadon por oferti pli da prelegoj

Estas konata fakto, ke Esperantistoj ŝatas kunsidi. Metu du Esperantistojn en unu ĉambron kaj ili formos estraron, komitaton kaj tri laborgrupojn. Kaj kiam oni ne kunsidas, oni prelegas pri gravaj temoj kiel teta-kuracado, tutmonda justeco aŭ katoj. Por plenumi al la komuna deziro de la Esperantistoj la organiza teamo de JES decidis en 2014/15 forstreki el la programo ĉiujn festojn por povi havi pli da kunsidoj kaj prelegoj.

Krom la kutimaj kunsidoj de GEJ kaj JEFO okazos ankaŭ komitatkunsido en multaj sesioj, kunsidoj de la organiza teamo, kaj kunsido de la kunsidemuloj. Al la tradicia oferto de prelegoj aldoniĝas ĉi-foje sesio pri aktivula maturiĝo, sciencaj prelegoj, mallongaj prelegoj sub la kodnomo peĉakuĉo, kaj oni kompreneble ne forgesu la prelegojn de Muzaiko.




*Eĉ dum la koncertoj estos prelegoj.*

La organizantoj konsideris ankaŭ okazigi prelegon pri efika kunsidado kaj kunsidon por kunordigi prelegojn, sed decidis, ke la partoprenantoj tamen havu tempon por dormi.

## Diskriminacio kontraŭ diskriminaciemuloj!

La ĉiuvintra renkontiĝo Junulara E-Semajno, ĝis nun ekzemplo de toleremo kaj kunvivado, kun sia iniciato sukcesis ofendi grandan grupon de partoprenantoj. Diskriminaciado, antaŭe ŝatata hobio en la kunveno, nun spertas fortajn kontraŭjuĝojn kaj malamon. Grupo de viktimoj organizis kunsidon por starigi kontraŭ-kontraŭ-diskriminacian teamon.

## El la tombo de Zombenhof

Amiko antaŭnelonge demandis al mi, kial mi ne venos al JES. Ĉu eble estas ia bojkoto, ke tiom da polaj aktivuloj ĉi-jare ne venas al la granda vintra kunveno? Mi klarigis, ke mi jam havas planojn por la festotagoj: kuŝi putriĝante en mia tombo, kiel ĉiam. Kaj mi ne scias pri aliaj poloj, sed certe ne estas iu konspiro (almenaŭ ne pri tio ĉi).

Ekzistas inter Esperantistoj la miskompreno, ke se iu ne venas al ĉiuj renkontiĝoj, tiu persono jam kabeas aŭ ne estas vera Esperantisto. Sed Esperanton oni ja povas uzi en multaj manieroj, kaj la lingvo ne estas kreita nur por vojaĝemuloj. Por mi kutime sufiĉas retumi kaj troli en Esperantlingvaj babilejoj sub diversaj kaŝnomoj. Aliaj eble preferas ricevi gastojn, aŭ legi librojn. Nura grava afero estas, ke oni ĉiam legu la freŝan Pos-Amikon.

*-Lazaro Zombenhof*

## La horoskopo

**Ŝafo:** Atentu ne glitfali sur 'blanka akvo'!

**Taŭro:** Via plej timiga koŝmaro realiĝos: viaj gepatroj eklernas Esperanton.

**Ĝemeloj:** Vi malkovros, ke festego ne egalas al prelego.

**Kankro:** Alparolu iun surstrate en Esperanto kaj vidu la rezulton.

**Leono:** Vi malkovros novan manieron por malfermi botelojn.

**Virgulino:** Post la AMO-sesio vi ne plu estos.

**Pesilo:** Vi preferas kunsidi kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Vi maltrafos buson al ekskurso, al kiu vi ne planas iri.

**Aleks Kadar:** Vi provos leĝe ŝanĝi vian aĝon por profiti rabatojn.

**Sagitario:** Januaro estos bona monato por postebriiĝi.

**Kaprikorno:** Vi decidos investi en steloj anstataŭ rubloj.

**Akvisto:** Vi estos vekita de tro laŭta prelego.

**Fiŝoj:** Vi konfuzos ŝampanon kun ĵubrovko, sed ne bedaŭros.